# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 1 Januaro, 2018

*Karaj Legantoj,* ***Feliĉan Novan 2018 Jaron!*** *Estu ĝi prospera, sukcesa kaj sana por ĉiuj el ni! Hodiaŭa numero de nia bulteno estas dediĉita al unu el la plej imponaj festoj de la Zamenhofa Jaro (2017), kiu okazis sur nia Ter'globo.* –Viktoro-Redaktoro

## Zamenhofa Tago'2017 *de Araneo*

Mi dum longa tempo, preskaŭ 14 jaroj, estas membro de la E-societo de Ŝikago, prezidis la Societon dum 6 jqaroj, aranĝis multajn eventojn, sed la ĉi jara selebrado de la fino de la Zamenhofa jaro impresis ankaŭ min: partoprenis ĝin pr. 40 gesamideanoj el 4 ŝtatoj de Usono: Ilinojso, Viskonseno, Indiano, Vaŝingtonio. Vi povas demandi – "Kial?". La respondo estas ege simpla – aranĝis ĉion estraro de nia E-societo sub la gvido de d-ro Leszek Kordylewski. Por ŝatantoj de statistiko mi devas aldoni, ke partoprenis la okazaĵon 5 prezida(i, o)ntoj de nia E-societo: Humberto Perez, Roberto, Viktoro Pajuk, Leszek Kordylewski, Eric Killian; 5 doktoroj de diversaj sciencoj (biologio, juro, kemio, neŭrologio). Post nia evento aperis sufiĉe justa artikolo pri Esperanto en NYTimes, kie estis raportita, ke en Novjorko kunvenis… 12 E-istoj: nytimes.com/2017/12/21/nyregion/esperanto-nyc.html Kaj en Ŝikago – trioble plu!



*La Ĝenerala Konsulo de Pollando d-ro Piotr Janicki kaj la prez. d-ro Les Kordylewski inaŭguris la ekspozicion.*

Do, laŭ la vico: preparadoj al la Festo komenciĝis antaŭ 2 monatoj, kiam nia prez. L. Kordylewski, ĉefa motoro de la kunveno, subtenata de sia edzino Anna, anoncis pri la ebla financa subteno fare de la Ĝenerala Konsulejo de Pollando en Ŝikago (oni devas substreki, ke nia urbo estas la plej granda pola lokejo en la mondo!). Pro tio ni esprimas nian varman dankon al la Konsulejo Ĝenerala en Ĉikago kaj al la Ministerio pri Eksteraj Aferoj de la Respubliko de Pollando por doni la donacon kaj helpon en la efektivigo de la projekto. Dankon denove!

Je la tagmezo al la impona biblioteko de la NEIU (Ronald Williams biblioteko en la Nord-Orienta universitato de Illinois-kampuso, 5500 N. St. Louis St.) venis la Ĝenerala Konsulo de Pollando d-ro Piotr Janicki, kiu mallonge raportis pri la Zamenhofo kaj E-o en la angla (www.youtube.com/watch?v=-FI9ZMXMCF4), kaj persone inaŭguris (tondris permane la verdan rubandon) la ekspozicion: ĉiuj grandaj 18 tabuloj estis prezentitaj al multaj vizitantoj. La fakton registris multaj radio- kaj TV- kompanioj, multaj E-istoj estis intevjuitaj por la sekvantaj elsendoj. Post la solena parolado kaj preĝo "Patro nia" (tr. L. Zamenhof) fare de la prez. Kordylewski, membro de la E-societo, vikario de la Luterana Eklezio Hanso (Becklin) vokis ĉiujn al la komuna preĝo kaj benis la tablon kun manĝaĵoj-trinkaĵoj, en Esperanto. Laŭ tradicio, gesamideanoj kantis E-himnon "La Espero", ĉi foje la kantadon majstre akompanis violone s-no Mateo (*vd la foton*). Poste li ludis multajn irlandajn kantojn, same kiel flutis Tina Seastrom. Bedaŭrinde, ĉi foje ni ne aŭdis gitaron de s-no Byron kaj pianon de Jerzy Kordylewski.



La kultura kaj scienca programo abundis. Speciale por ĉi evento s-no Viktoro trovis bonegan poemon de la renoma ukraina poeto Maksimo Rilskij, dediĉita al la mondfama pola muzikisto Frederiko Ŝopeno (tradukita en E-o, *vd suben*), s-no Les deklamis la komencajn strofojn de la fama poemo de Adam Mickiewicz "Sinjoro Tadeo" (1834) en majstra traduko de Antoni Grabowski (1918). Poste ĉiuj partoprenintoj translokiĝis al la tria salono, kie okazis la scienca kaj organiza partoj de la kunveno.

Rezulte de la komuna elekto nov-elektita prezidanto de la E-societo de Ŝikago fariĝis d-ro Eric Killian. Gratulojn! Nun la estrar-listo por la sekvantaj 2 jaroj estas:

- d-ro Eric Killian, prezidanto
- Randy Ream, vic-prezidanto
- Tina Seastrom, sekretario
- Charles Gunn, kasisto
- Hans Becklin, membro
- d-ro Les Kordylewski, prezidinto

Kaj nun – pri la interesaj prelegoj. S-no, vikario ☞

Hanso prelegis dulingve (Esperante kaj angle) pri la vivo kaj vojo de nia Majstro Ludoviko Zamenhofo. Li ankaŭ menciis pri la ĉefaj libroj dediĉitaj al la Majstra biografio. Estafedon transprenis Andreo Kolganov kaj rakontis pri la cifereca monuno – Bitcoin. Ĉu ĝi fariĝos internacia, kiel nia Lingvo, ni ekvidu.

Ĉiujn E-programerojn atente (dorme) sorbis la plej anino de la E-societo Abigail, 3-monata filineto de Marteno kaj Laura.

Inter alie, la ekspozicio estos disponebla en NEIU ĝis la 18-an de januaro 2018, kiam ĝi estos fermita kun seminario (16: 30-18: 30) en la Fako de Lingvoj NEIU, sur la 4-a etaĝo de la universitata biblioteko Ronald Williams. Interesojn pri plua uzo de la ekspozicio en 2018 ankaŭ esprimis aliaj akademiaj centroj, institucioj kaj bibliotekoj, inter aliaj: Pola Muzeo, Irlanda Centro, Copernicus Centro, Vaŝingtona Biblioteko, Holcaust Muzeo. Ne hezitu, prenu viajn amikojn, konatulojn, familianojn kaj vizitu la ekspozicion! Dankon!



## ŜOPENO *de Maksim Rilskij ©1934*

*Tradukis Nadia Andrianova-Hordienko*

Ŝopena valso… Kiu ĝin ne ludis,
Kiu ne aŭdis? Kaj sur kies lipoj
Ne aperadis la ridet' kaprica,
Ne brilis la fajrero en okuloj,
Duone de la amo, de malĝoj'
Pro la sonado ĉi koket-memvola,
Kiel vesper' de ora tago trista,
Tre arda, kiel kiso nefinita?

Ŝopena vals', nelerte plenumita
Je la piano malagordiĝinta
(En tio ĝi atingis idealon).
Arĝentan foron li malkovris tuj
Por mi dum la vespera laco,
Kiam la koro serĉas nur karesajn
Liniojn kaj neakrajn nur kolorojn.
Kaj ie kaŝas ardon kaj pasion,
Kaj revon, forton, kiel tero kaŝas
La nevenkeblajn ĝermojn de herbar'…

En grizan neĝon, en nekonatecon
Kuregas la ĉizita bela sledo,
Kaj kiel sun' ekbrilis en okuloj
Malico aŭ malgajo – kiu scias?
Pasia aŭ malvarma – kiu diros?
Ĉu lasta aŭ unua ĉi prosper'.

Feliĉo – tio! Manojn mi etendas –
La neĝo batas el sub fridaj hufoj,
Sin ĵetis foren aro de kornikoj
Kaj ronde sin etendis la dezert'!

Ĉevalon selu! Mi postkuru ŝin!
Feliĉo tio ĉi! Feliĉo! Haste
Enpikas spronojn mi en varman flanskon –
Kaj ree vidas mi vizaĝon, kiu
El sub felaro montras sin… Al mi?
Ĉu estas larmoj sur okuloj ŝiaj?
Ĉu larmoj de la ĝojo – kiu diros?
Ĉu larmoj de la tristo – kiu scias?

Vesper bruligas iajn domfenestrojn
Kaj bluan nubon ardo trapenetras,
Kaj tra arbar' vidiĝas lum' de fajro,
Kaj vento klinas branĉojn, kantas al mi
En la orelojn… Tiu ĉi feliĉo!
Kaj senesper'!

Sinjoro Frederiko...
Mi scias, ke nek vento, nek ĉevalo,
Nek sledo estas en la valso,
Ĉi tio estas nure elpensaĵo.
Sed tamen… Ĉu Pollando, ĉu George Sand –
Du amatinoj, same senkompataj! –
Inspiris la teneran sonoventon –
Ĉu gravas tio nun? Hodiaŭ mi
Ĉi tiun sonĝon amas, ankaŭ vin,
Kaprica kaj korflama muzikisto…


**Adreso:**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org


**Estraro:**

Prezidanto – Eric Killian
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Charles Gunn
Membro – Hans Becklin

**MEMBROKOTIZOJ**

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula membro: $20
Baza membro: $10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

**SEKVANTAJ KUNSIDOJ**

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko sur la 6-a (sesa) etaĝo norda stud-ĉambro: 400 S. State St., Ŝikago.

**23-an de Januaro** – 85-datreveno de Holodomoro en Ukrainio (gvidas Araneo)

**20-an de Febuaro** – Vintraj Olimpikaj ludoj (Puramo Ĉong)

**27-an de Marto** – Pri la 9-a TAKE (raportas Randio)

## TAKE *de Araneo*

La 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto estas evento kunorganizata de Kuba Esperanto-Asocio kaj la Amerika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Ĝi naskiĝis kiel forumo por la regiona agado kaj estas la ĉefa kongreso kiu celas ne nur arigi la esperantistaron de la Amerikoj, sed ankaŭ esperantistojn el la tuta mondo kiuj iel volas subteni kaj kunpartopreni la regionan agadon.

Havano levas denove. Vi estas bonvenaj en Havano, la kuba ĉefurbo, la venontan februaron, inter la 11-a kaj 17-a, sed ankaŭ antaŭ kaj postkongrese.

La kuba esperantistaro atendas vin!